

STARTO

OFICIALA ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

N-ro 4

Julio-Agusto 1969

S A L U T O

Vokas voĉ^o de Veinemöinen,
Vibras vok^o en vaga vento,
Kaj ĝin mugas malproksimaj
Montoj, maroj murmurantaj...

E L

F I N N L A N D O

Luktu firme, forte fajre,
Kaj sufoke kaptu kole
Tiun urson ulnounge,
La militon malicegan
Monstron de la Mortolando

Kálmán Kalocsay, 1922
(laŭ inspiro el la malnova finna legendo)

Jam la duan fojon fariĝis kongresloko de Esperantujo la lando de "Kalevala". La 54-a Universala Kongreso de Esperanto en Helsinki - 26/7 - 2/8 1969 - estis speciale atentinda ankaŭ por nialandaj esperantistoj - unue post dek ok jaroj partoprenis la UK reprezentantoj de memstaraj asocioj - la ĉeĥa kaj slovaka. Ni ĝoje konstatis, ke longedaŭran aplaudon de du mil kongresanoj el 40 landoj - inter ili reprezentantoj de registaroj kaj diplomatoj - rikoltis ĝuste la salutparolo de la prezidanto de ĈEA, samideano Josef Vitek.

Alia notindaĵo estas, ke en la sama jaro ekfunkciis kiel organizanto de la kongresoj (KKS) ĉeĥa samideano Mikuláš Nevan, kiu grandparte meritis pri ambaŭ eventoj - la ĉeĥa kaj internacia.

Ni kompreneble klopodis, okaze de la kongreso, ligi pli intiman kontakton kun la tutmonda organizaĵo esperantista. Kiel sciigis nia delegacio, la estraro de UEA montris vivan intereson pri membriĝo de Ĉeĥoslovakio al UEA. Tamen, por realigi tiun ĉi deziron la afero postulas niaflanke gajni necesajn rimedojn por transpigi la kotizojn. Pri pliaj paŝoj tiudirekte ni klopodos informi gustatempe niajn legantojn.

PAROLADO DE LA PREZIDANTO DE UEA

En sia inaŭgura parolado Prof. Ivo Lapenna koncize prezentis la evoluon de la lingva demando post la dua mondmilito kaj la nunan situacion. Li donis plurajn ekzemplojn, ke la lingva problemo en internaciaj rilatoj daŭre komplikigas. Tio estas aparte rimarkebla en Unuigintaj Nacioj kaj en ĉiuj interŝtataj organizaĵoj apartenantaj al UN. Pro la sen nombraj malfacilaĵoj labori en kvin lingvoj oni inventis la novan kategorion de laboraj lingvoj. La angla kaj franca ricevis tiun privilegian pozicion, sed tio entenis la ĝermojn de malkontento kaj de prilingvaj bataloj; unue la hispana kaj fine, en 1968, la rusa fariĝis laboraj lingvoj de la organizaĵo.

Simila evoluprocezo okazas en aliaj interŝtataj organizaĵoj. En UNESKO ekz. la Ĝenerala Konferenco havas ok oficialajn lingvojn, dum la nombro de laboraj lingvoj jam kreskis de du al kvin kaj en kelkaj kazoj al ses. En diversaj regionaj interŝtataj organizaĵoj aliaj lingvoj estis akceptitaj, ekz. en la europaj institucioj la franca, germana, itala kaj nederlanda. Morgaŭ tiu sistemo kaŭzos kompletan kolapson kaj tiam oni devos fronti la politikan kaj kulturen realaĵon, kiu postulos radikalan solvon: la akcepton de la internacia lingvo Esperanto por ĉiuj internaciaj rilatoj.

Tion oni komencas kompreni en oficialaj medioj sur la plej alta nivelo. En la debatoj pri la lingva demando en UN du delegitoj - la hispana kaj la brita - tuŝis la demandon de komuna lingvo. Sir Leslie Glass diris laŭvorte: "Eble iam, lasante flanken la fieron pri la naciaj lingvoj, ni ĉiuj lernos unu komunan duan lingvon. Se la popoloj povus interkomuniki per unu internacia lingvo, tiam estus preskaŭ nenio, kion la homaro ne povus atingi."

En la fino de sia parolado Prof. Lapenna diris: "La homo sukcesis meti sian piedon eĉ sur la dezertan surfacon de la Luno. Mirinda kaj admirinda, aŭdaca kaj kuraga, epokfara evento, pri kiu fieras ne nur Usono, sed ni ĉiuj... Devas veni la tempo, kiam tiu sama homo povos viziti apudan landon kaj kompreni sian najbaron, kiam la mastro de la mondo ĉesos esti surda kaj muta en fremdaj lingvaj medioj, kiam li povos kompreni kaj esti komprenata en kiu ajn angulo de la terglobo. La ĉefa tasko de tiu ĉi kongreso estas trovi la plej efikajn metodojn por atingi, ke tiu evento, pli epokfara ol la flugo sur la lunon, realigu kiel eble plej baldaŭ."

LABORAJ TAGOJ DE LA KONGRESO

Gazetara servo liveris al ni serion da informoj pri diversaj kongresaj aranĝoj, el kiuj ni elektis kelkajn:

Internacia Somera Universitato okazigis prelegon de ĉero Italo Chiussi "Esperanto kaj Islamo." (La aŭtoro estas tradukinto de "La Nobla Korano" en Esperanton) Ĝestis i. a. ambasadoro de UAR en Helsinko ĉero Gamal E. Barakat.

Internacia Scienca Asocio Esperantista decidis ĉe sia kunveno organizi renkontjare konferencojn de sciencfakaj societoj kaj komenci eldonadon de popularsciencaj kaj fakaj libroj.

Interreligia kunveno esperantista sub prezido de s-ro Eizo Itō konsistis el dialogoj de la reprezentantoj el dek diversaj religiaj sektoj pri la temo "Hombildo laŭ diversreligiaj instruoj" (spiritismo, kvakerismo, unitarismo, bahajismo k. a.).

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj anoncis, ke en 1970 okazos Internacia Instruista konferenco en Aŭstrio kaj samjare aperos Internacia Pedagogia Revuo. Paralele kun la kongreso okazis Lerneja Konferenco en Dipoli. Ni sciigis, ke en la lasta lerneja jaro ĉirkaŭ 17 000 gelnanojtoj en 500 lernejoj en 12 landoj lernis la Internacian Lingvon.

Mondpaca Esperantista Movado aranĝis publikan kunvenon, kiu salutis sekretario de la Tutmonda Paĉkonsilantaro, kies sidejo estas Helsinko. En la unuanime akceptita deklaro estis aprobita ankaŭ la rezolucio de Tutmonda Pacasembleo en Berlino (junio 1969).

La Komitato de UEA decidis altigi la kotizojn de UEA por individuaj membroj per 20 procentoj por ekvilibrigi la spezokonton. Oni elektis ankaŭ la novan estraron (Iapenna, Wensig, Carlén, Becker, Woessink, Moritz, Uspieński kaj Thierry).

Teatra prezentado de Internacia Arta Teatro okazis en la Urba Teatro de Helsinko, kie estas sidlokoj por ĉ. 900 personoj. Oni ludis "Vilhelmo la Konkeranto" de Vanĉa Kljaković, "Aparta Ĝambro" de Claude Santelli kaj "Hotelo" de Branko Ćopić.

Firma vespero estis multnombre vizitita. Kostumita sesopo prezentis tie per deklamado, muzikado kaj plorrecitado partojn el la eposo "Kalevala".

Belartaj konkursoj proklamis la rezultojn en originala poezio (1-a premio Nicolino Rossi el Italio), tradukita poezio (prof. Gaudenzio Pisoni, Italio, originala prozo (1-a premio ne aljuĝita, 2-a kaj 3-a premio Andreo Szabo, Hungario), originala dramo (1-a kaj 2-a premio ne aljuĝita, 3-a premio Eduard V. Tvarožek, Ĉeĥoslovakio).

Esperantista Ligo Filatelista rekomendis ke KKS klopodu en la lando, kie okazas UK certigi eldonon de speciala stampo kaj ankaŭ memoriga poŝtmarko. Okaza stampo estis en uzo dum la Kongresa semajno. Ĝi estas havebla sur kongresa koverto kontraŭ 1 rpk ĉe Marinko Givoje, P. p. 25, Zagrebačka Dubrava, JUGOSLAVIO.

Ĝiutaga kaj rapida informado pri la Kongreso fare de Pola Radio estis tre utila al miloj da europaj esperantistoj restintaj en siaj hejmoj. Krome la taggazetoj en Helsinko informis regule pri la kongresaj okazintaĵoj, same kiel radio, televido kaj presagentejo.

REZOLUCIO I (resumo)

La 54-a Universala Kongreso de Esperanto, diskutinte la aktualan mondan lingvan situacion en ĝiuj ĝiaj aspektoj

I. KONSTATAS

1. La politika konstelacio en la nuna mondo estas rezulto de pluraj evolu-tendencoj, ekestintaj kiel sekvo de la Dua Mondmilito kaj determinitaj en la lasta linio de potencpolitiko kiel baza faktoro.

N á š j u b i l a n t

Theodor KILIAN (narozen 26. září 1894), profesor obchodní akademie a ředitel vyšší zdravotnické školy ve výslužbě, čestný člen ČES, se dožívá 75 let.

Jako vystudovaného učitele jej pohltila ve dvaceti letech světová válka. Dostal se do zajateckého tábora na Sibiř, kde byl hotový jazykový babilon. Mezi spoustou řečí zaslechl tehdy Theodor také dosud mu neznámé esperanto, které si později dokonale osvojil.

Po návratu ze zajetí se dal plně do služeb nové myšlenky. Napsal jednu z nejlepších učebnic esperanta a řadu publikací o esperantu a jeho tvůrci, proslovil dlouhou řadu přednášek v brněnském rozhlasu, založil esperantské kroužky v Třebíči a Ivančicích.

Jeho dům byl opravdu pohostinným pro každého esperantistu na cestách. Když se nad Evropou zatemňovalo a spisy Karla Čapka burcovaly svět, přeložil mistrovsky do esperanta Čapkovu Bílou nemoc.

Po druhé světové válce se vrhl znovu s mladistvým elánem do práce. Pracoval jako člen výboru Svazu esperantistů ČSR, učil esperantu v Lančově a před tím se uplatnil jako skvělý učitel i na Letní esperantské koleji v Doksech a v esperantských vysíláních brněnského rozhlasu a ve Verda Stacio, jejíž byl spoluvůrcem. Kdo spočítá jeho zajímavé přednášky po různých klubech v republice?

S velikou energií pracoval na podpisové akci ve prospěch esperanta organizované pro OSN v roce 1951. Podarilo se mu získat více než 1 400 000 podpisů jednotlivců i organizací.

Přepracoval a znovu vydal svou původní učebnici esperanta, jejíž náklad dosáhl celkem asi 100 000 výtisků. Pro potřeby SETu vypracoval malou učebničku a sestavil malý kapesní slovníček "808 slov" a ač mu čas naměřil již tři čtvrtě století, nebere jaksi léta na vědomí a pracuje jako před třiceti lety. Může se klidně ohlédnout za sebe: brázda, kterou vyoral, je hluboká a semeno jím zaseté nese ovoce.

-JP-

+++++
Do poštovní schránky...:

Čtenář Karel K ř í ž z Plzně nám píše: "...jsem s uspořádáním časopisu spokojen, protože nám podává...dobrý, i když stručný přehled celého hnutí.. Aby mohl plnit co nejlépe svoje poslání, bylo by zapotřebí, aby výtisky byly pečlivě provedeny i po stránce grafické.

Odpovídáme: Zlepšení je v dohledu. A snad již v blízké budoucnosti budeme mít časopis, který svou formou více uspokojí nároky odběratelů

Toto číslo je již šesté od založení Starta. Doufáme, že i nadále si zachováme přízeň čtenářské obce a dosáhneme živého a bezprostředního styku navzájem.

Jako jednu z možností jsme protentokrát - z iniciativy ing. E. Felixe z Prahy - opět zvolili anketu. Vaším úkolem bude stručně odpovědět - nejpozději do 15. října - na tuto otázku:

1. Kterých pět úkolů považujete za nejnaléhavější v činnosti výboru ČES?..!

Na slyšenou redakce

FERIOJ ESPERANTMANIERE

oo

SET apud Lančov - 1969

Loko - Eble neniu el niaj legantoj bezonas klarigon pri tiu ĉi mallongigo. Ĝi vere fariĝis jam nocio. Ĉijara tendaro okazis kiel ĉiam en la lastaj dek kvar jaroj sur la sama bela faligejo, ĉiuflanke ĉirkaŭita de arbaro, apud la "Arĝenta Golfo" de la ega lago, kreita per valbaraĵo de Vranov.

Anaro - La unuan etapon (13. 7. - 26. 7.) partoprenis 120 anoj, la duan (27. 7. - 9. 8.) 111 anoj plus sepnombra estraro en ambaŭ etapoj. La unua etapo konsistis plejparte el junularo, dum la dua "junis" plene. Laŭsekse: la unua etapo havis 69 procentojn da inoj, la dua 61.

Gastoj - La tendaron partoprenis krom du nederlandanoj, kiuj venis nur vizite, po unu jugoslavo kaj aŭstro, tri francoj kaj unu polo. Ĉar neniu el ili konis la ĉeĥan, ne estis eble kun ili krokodili kaj sekve eĉ B-kursanoj klopodis interkompreniĝi per Esperanto, kio tre helpis venki komencan paroltimon.

Ĉiun etapon vizitis la spirita patro de la tendaro kaj gardanto de ĝia lingva pureco, Prof. Theodor Kilian, kaj ĝia protektoro, direktoro de la Kultura domo en Třebíč, s-ano F. Sedláček. Venis ankaŭ malnova samideano Vuk Ehtner kaj du junaj anoj de la Brna redakcio de "Mladá fronta," D. Semčišinová kaj J. Rektor, kiuj poste (6. 8.) publikigis en sia gazeto belan artikolon kun fotoj, entitolitan "Prázdniny po esperantsku" (Ferioj esperantmaniere).

Instruado ĝenerale - Oni instruas en rondetoj po 10-14 anoj en kursoj A, B, C kaj D. Kursoj A kaj B procedas laŭ la lernolibro de Theodor Kilian, verkita speciale por SET. Kurso C havas taskon unue paroligi la lernanton, due riĉigi lian vortprovizon. Al la unua tasko servas diversaj ludoj, dua tasko estas plenumata helpe de skriptoj de s-ano Chvosta, kiuj enkondukas frekventantojn en fakajn konversaciojn. Kurso D havas taskon eduki estontajn instruistojn de Esperanto. Ĝi estas gvidata laŭ altlerneja maniero, komplete en Esperanto, kaj enhavas prelegojn pri E-historio, literaturo, detala gramatiko kaj didaktiko.

Instruado ĉijare - okazis ĉiutage de la 7.40 ĝis tagmezo, la lasta instruohoro estis dediĉita al kantado.

La unua etapo havis po tri A, B kaj C-kursoj kaj unu D-kurson; la dua havis kvar A-kursojn, tri B-kursojn kaj unu C-kurson.

Ĉe la klasifiko oni konsideris ne nur la absolutan gradon de la scioj, sed ankaŭ la ĝeneralan sintenon de la lernanto.

Kultura programo - Ĝi konsistis el vesperaj prelegoj, plejparte kun lumbildoj pri Esperanto-kongresoj, pri estintaj SEToj, pri la skolta esperantista movado (S. Lešinger), kaj pri la Ĉeĥa Esperanto-Asocio (D. Kočvara). La lastan prelegon sekvis disdonado de aligiloj al ĈEA.

Al kultura programo apartenas ankaŭ tri posttagmezaj ekskursoj al kasteloj Vranov kaj Bitov kaj al la historia urbo Znojmo.

Jam en pasintaj jaroj aperadis en SET murgazeto por komenti la tendaran vivon. Ĉijare aperis krome regula gazeto SET-ano, havebla por ĉiuj partoprenantoj kaj enhavanta ĉefe sciigojn konservindajn, ekzemple plenan adresaron de la tendaranoj. Redaktis, verkis, tajpis, multobligis kaj distribuis ĝin s-ano Chvosta.

Amuza programo - estis multspeca kaj kontribuis al ĝi preskaŭ ĉiuj. Dum la vesperaj tendarfajroj, dum la posttagmezoj, dediĉitaj al sporto kaj lignokolekto, kaj eĉ dum la matena instruado ofte eksonis el la rondetoj sincera rido. Estas malfacile diri, kiu havas la plej grandan meriton pri la bonhumoro: ĉu D. Kočvara kun sia neelĉerpebla inventemo, ĉu "Leontodo" (M. Hlaváč) kun sia simplanima popola humuro, aŭ ĉu ĉefe la suno, ĉijare vere ne ŝparanta siajn radiojn. Ĉiutage oni baniĝis en la golfo, remis (la tendaro havis je dispono kvar boatojn), ludis badmintonon kaj volejbalon. Tradicia karnavalo, okazinta meze de ĉiu etapo, demonstris per kostumoj, elŝorĉitaj el man- kaj litotukoj, herbo kaj foliaro, ke la krea fantazio de tendaranoj ne konas limojn.

Multaj per sia oferema laboro kontribuis al la sukceso de la tendaro kaj se mi devus nomi ĉiujn, la loko apenaŭ sufiĉus, tamen permesu, ke mi tostu almenaŭ je la sano de Pavel Sittauer, viro, sen kiu la SET simple ne ekzistus.

0
000
00000

Fx.

Ankaŭ por la alia jarsezono, ne malpli bela ol somero, oni jam preparis por vi allogan aranĝon: IFES 1970. Ĝi estas mallongigo de

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-SKISEMAJNO 1970,
.....

kiu okazos inter 31. 1. kaj 7. 2. 1970 en la montodomo Chata pod Sokolím en Vrátná-valo, Malá Fatra-montaro, proksime de la vilaĝo Terehová, distrikto Žilina (nordokcidenta Slovakio).

La domo disponas pri kvar dulitaj kaj dek kvarlitaj ĉambroj kun varma akvo. Medicina servo garantiita. La prezo ĉ. 600 kronoj inkluzive de 7 tranoktoj, 3 manĝoj potage sen trinkaĵoj, veturo per aŭtobuso el Žilina al Vrátná kaj reen. Dum la semajno oni ne nur skias, sed ankaŭ amuziĝos, okazigos lumbildvesperon, filmprelegon k. a.

Limdato por aliĝo estas 30. 11. 1969. Ĝis tiu tempo bv. sendi ankaŭ antaŭpagon (21 us. dolaroj aŭ egalvaloro por sep tagoj). Informojn petu, laŭeble kontraŭ respondkupono, kaj aliĝilon sendu al: Ladislav Kovář, U kostelíčka 519, Č e s k á T ř e b o v á, antaŭpagon al Ladislav Léni, Pod vrchem 59, P l z e ň 12, Ĉ E Ĥ O S L O V A K I O. La IFES rajtas partopreni ankaŭ neesperantistoj.

00000
000
0

El renkontiĝoj preparataj alilande ni mencias

TRILANDAN ESPERANTO-KONGRESON,
.....

kiun komune aranĝas Belga, Nederlanda kaj Germana Esperanto-Asocioj por akcenti internacian kunlaboron. La kongreso okazos en kuraĉloko Aachen, de la 27-a ĝis 31-a de marto 1970. Temo: "L i n g v a j p r o b l e m o j e n E ŭ r o p o." En la programo estas tuttaga ekskurso tra pitoreskaj lokoj limregionaj de Nederlando, Belgio kaj Germanio. Kotizoj: Kongresano GM 12, edz/in/o GM 6, junulo 15-25-jara GM 5. Post 1. 1. 1970 la kotizoj ĉiukategorie plialtiĝos je GM 3. Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Karl-Marx-Allee 172, 51 A a c h e n, O K C I D E N T A G E R M A N I O.

0
000
00000

V ý r o č í p ř í k o p n í k a

"Bývá chvályhodným zvykem esperantistů, že na svých shromážděních připomínají mimořádné zásluhy průkopníků esperanta; ti to průkopníci dokazují svou činností, že esperanto není jen mlhavý fantóm nebo hračka pro děti, ale důležitý činitel pro dorozumění mezi národy."

Autorem těchto slov je František O m e l k a, od jehož narození uplynulo právě 65 let (19. 8. 1904 v Starém Městě u Uherského Hradiště). Působil jako učitel v Blatnici u Veselí nad Moravou, poté v Hluku a Otrokovicích, později jako ředitel školy v Napajedlích a Otrokovicích. V roce 1956 udělilo ministerstvo školství F. Omelkovi čestný titul "výborný učitel."

Fan Omelka přeložil z esperanta do češtiny a vydal v esperantu velkou řadu prací, vesměs pro mládež a o mládeži. V činnosti spisovatele pro mládež je jeho zásluhy význam. Nelze opomenout ani jeho činnost organizační a práci propagátora esperanta. Vedl řadu kursů a v Otrokovicích, kde založil esperantský kroužek, uspořádal dva esperantské sjezdy. Esperanto dalo F. Omelkovi mnoho přátel ve světě. K nejlepším patřili W. H. Fenton a Jack Scrivener z Kanady, kteří mu poskytli cenné informace k napsání známé knihy "La Alaska Stafeto" (pozn. redakce: přeložena do několika jazyků a vysílána v islandském rozhlase)

František Omelka je znám i jako pedagogický spisovatel. Zanechal řadu praktických příruček pro učitele, a jeho semináře o vyučování slohu měly ohlas po celé republice.

Mnohostranná osobnost a dílo F. Omelky zasluhuje, abychom se k němu vraceli i dnes.

K. Chudoba
a kolektiv E-kroužku v Gottwaldově

El niaj vicoj foriris s-ano A. V. Zednik el Praha-Modřany, esperantisto de antaŭ la unua mondmilito. Dum pluraj jaroj li sukcese peradis per IL kunlaboron inter la redakcioj de ĉeĥa (Dikobraz) kaj ĉina satiraj gazetoj kaj krome li funkciis kiel landa sekretario de TEĴA. Ĉe la funebra ceremonio la 30-an de julio en Praha-Strašnice adiaŭis la forpasinton la prezidanto de la IK en Praha ĉaro R. Horský, kondolencan leteron al la familianoj sendis la prezidanto de ĈEA.

Předseda ČES obdržel toto poděkování národního umělce Karla Högra: "Srděčně děkuji za blahopřání k mým narozeninám Vám, i všem esperantským přátelům. Též by esperanto přispělo k dorozumění mezi národy!"

Vizitis nia s-ano Levoslav Kraus, ĉina prezidanto de JEL, kiu meze de julio restadis en nia lando.

Nia amiko Johan Windisch el Stuttgart farigis per libervola kontribuajo 10 GM (100 Kčs) subtenanto de nia asocio. Same kiel lia samlandano s-ano Liebl li ricevas kaj legas nian gazeton.

Digna donaco - du italaj turistoj venintaj en aŭgusto al Praha meminciate fordonis sian sangon en malsanulejo. "Ni faras tion por pruvi niajn amikajn sentojn al la popoloj de Ĉeĥoslovakio," deklaris la donacintoj en IK Praha: Luciani Mentani, fakdelegito de UEA por turismo en Torino kaj lia amiko Bera Secunda.

...Co nového ve Svazu...
.....

V červenci se naše "prozatímní kancelář" přestěhovala do prostor Osvětového ústavu ve Francouzské ulici 22 (korespondenční adresa zůstává nezměněna - Blanická 4, Praha 2), nové telefonní číslo je 25-68-92. Upozorňujeme všechny, kdo chtějí svazovou kancelář navštívit, že je nutné se předem písemně ohlásit, neboť podléháme řádu Osvětového ústavu. Návštěvní den je středa.

Dále žádáme všechny členy, kteří zaslali buď jen přihlášku bez příspěvku nebo pouze zápisné, aby co nejdříve poukázali zbývající částky na náš účet u SBČS Praha 1, č. 02 - 4632 - 7.

Na schůzi předsednictva ČES byl projednán stav distribuce propagační brožury Invito al Českoslovakio. Z celkového množství 6 000 ks. zbývá na skladě ještě 1 600 ks. 1 000 ks. z toho zůstane jako rezerva na příští rok k propagaci spartakiády.

Bylo rozhodnuto vydat pohlednici s mapkou Československa a informacemi o možnostech rekreace, historii a památkách v nákladu 3 000 ks., výrobní cena Kčs 1,10 za kus.



Stav členů ČES podle jednotlivých kroužků ke dni 2. 9. 1969
=====

Praha - 125, Brno (FKO) - 54, Ostrava (VŽKG) - 53, České Budějovice - 45, Mělník - 44, Třinec - 32, Gottwaldov - 29, Pardubice - 28, Liberec - 28, Žďár nad Sázavou - 28, Tábor - 27, Ústí nad Labem - 37, Polička - 25, Plzeň - 24, Ostrava-Poruba - 21, Písek - 20, Litoměřice (CMBF) - 19, Hranice - 18, Znojmo - 17, Jihlava (ZK) - 16, Olomouc (FKO) - 16, Havlíčkův Brod - 15, Hořice - 14, Opava - 14, Jihlava (DK) - 13, Havířov - 12, Herbortice - 12, Kolín - 12, Brno (I. B.) - 11, Stonava - 11, Svitavy - 11, Frýdlant v Čechách - 10, Lanškroun - 10, Moravské Budějovice - 10, Příbor - 10, Třebíč - 10, Turnov - 10, Karlovy Vary - 9, Vyškov - 9, Kladno - 8, Ostrava (ZV Žel.) - 8, Žamberk - 8, Městec Králové - 7, Místek (Slezan) - 7, Český Dub - 6, Jaroměř - 6, Most - 6, Semily - 6, Chocně - 5, Česká Lípa - 5, Hodonín - 5, Louky nad Ohří - 5, Šumperk - 5. Jednotlivě přihlášeno 59.

CELKEM 1 060 členů, tzn. dalších 356 za poslední dva měsíce. Tisícím členem se stal pan Jaroslav G r o d l z Nížkova (Žďár nad Sázavou). Blahopřejeme



.....
Ni pardonpetas la legantojn pro ofte ne klara preso en la 3-a numero de Starto. Espereble post riparo de multobligilo tiu ĉi numero estos jam iom pli belaspekta.
.....

K O R E S P O N D I

La redakcio akceptas senpage individuajn kaj kolektivajn korespondancojn, inzercojn ks. el eksterlando. Bv. indiki la aĝon, profesion, interesojn. Represo dezirata.

- Sep ĉarmaj japanaj fraŭlinoj - lernantinoj de komerca gimnazio deziras korespondi kun samaj ĉeĥaj gejunuloj: Tanaka Humiko, Nisitetsu-Apaato, 41, Hakozaki-Sinyasiki, Hukuoka-si (18-jara, intereso: aŭdi muzikon); Tahara Kimiko, Kamiosa 232-1, Hukuoka-si (17, legado, floranĝo); Nisimura Yuuko, Higasi-kooen 1130, Maedasi, Hukuoka-si (17, filmo); Ito Keiko, Kasii 1385, Hukuoka-si (18, filmo); Hukuda Satiko, Noke-danti 74, Noke 260-2, Hukuoka-si (17, filmo); Oota Mariko, Midorigaoka 1260-16, Yakatabaru, Hukuoka-si (17, legado); Maesaki Midori, Minosima 3-tyome 10-3, Hukuoka-si (16, legado), ĉiuj JAPANIO. Bv. korespondi nur aerpoŝte!

- Juna konstruisto de infanludiloj deziras korespondi kun samfakuloj. Lia edzino, kudristino, deziras ricevi revuojn pri modo. Reciprokas ĉion laŭdeziro. László A. Pölöskey, Szakasits A. utca 44/B, 8-a etaĝo, 47. loĝejo, Budapeŝt XI HUNGARIO

- Instruisto deziras korespondi kaj interŝanĝi temajn pm. En Esperanto, la germana, angla, franca, hispana, itala kaj rusa lingvoj. M. S. Zejtunjan, abona poŝtkesto 14, poŝtejo Kaliningrad - oblastnoj, USSR

- Skoto nederlanddevena, 20-jara farmisto el apudmara montaro deziras korespondi kun fraŭlino ŝatanta kamparan vivon. Reinout Goodheir, Tayvallich, Lochgilphead, SKOTLANDO

- Pri diversaj temoj deziras korespondi Leonid Ĥmelevskij, 3 Sverdlova 7, Konotop, Sumŝkaja oblastj, USSR

- Korespondi kun junaj gaedzaj paroj inter 30-35 j. (kun aŭ sen infanoj) deziras: St. Knichalová, U Hranic 13, Praha 10, ĈSR

- Kun esperantisto (eble sportisto aŭ instruisto) el Liberec deziras korespondi Giuseppe Trambaiolo, Via Centa 19, 36015 Schio, (Vicenza) ITALIO

- Kaj kun eksterlando, kaj kun enlando deziras korespondi 25-jaraĝa slovaka junulo kolektanta ipk kaj interesiganta pri lingvoj. Lia adreso estas: Jan Bombara, blok 34/2-1, Šaca, (Košice), SLOVAKIO, ĈEĤOSLOVAKIO

- ESPERANTO "FO-KI-MA" - En la kadro de Hungara Esperanto Asocio fondiĝis nova grupo, kies celo estas propagandi kaj disvastigadi internacian amikecon kaj pacon per la plej modernaj teknikaj iloj: foto-kino kaj magnetofon-aparatoj, helpe de talentaj amatoroj. Oni petas sendi gratulleterojn, poŝtkartojn kaj proponojn por korespondado kaj kunlaboro. Adreso: Esperanto fo-ki-ma, pf. 16, PO 119, Budapeŝt, HUNGARIO

D E Z I R A S

STARTO - oficiala organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio = redaktas: D-ro Josef Kavka, Jaroslav Mařík, ing. Fraantišek Sviták, Ivo Železný = respondeca redaktoro: Oldřich Knichal = Adreso: Blanická 4, Praha 2

25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO
 25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO
 25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO

Tuj post la Universala Kongreso okazis en Tyresö de la tria ĝis la deka de aŭgusto kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). En bela antaŭurbo de Stockholm kongresis 127 gejunuloj el 19 landoj. Krom tradiciaj programeroj - solena malfermo kaj fermo, oficiala balo, laborkunsidoj, tuttaga ekskurso kaj studvizitoj - ĉeestantoj havis dum la kongreso okazon partopreni serion da prelegoj "Junularo kaj Socio," kiujn postsekvis diskutoj. Unu el la plej interesaj prelegoj "Aspektoj de la Studenta Ribelo" ni aŭdis de la prezidanto de UEA, 9-a ano Prof. D-ro Ivo Lapenna.

Tuttaga ekskurso ebligis al ni konatiĝi kun la kastelo Gripsholm situanta okcidente de Stockholm, en Mariefred. En la sama tago okazis distra vespero, kiu estis amoza dank al 8-a ano Muramacu el Japanio kaj Prytz el Norvegio. Dum la balo junuloj elektis la plej ĉarman ĉeestantinon. Titolon "Fraŭlino Esperanto" gajnis fino Claude Nourmont el Francio. Plua vespero estis dediĉita al oratora konkurso. Unua premio estis aljuĝita al Zlatko Tišijar el Jugoslavio, kiu poste, kun aliaj amatoraj aktoroj el Zagreb, prezentis teatraĵojn. Ili vere sukcesis ĉe dankemaj rigardantoj. Necesas ankaŭ menciigi sabbatan manifestacion, kies signifo estis, ke multaj stokholmano eksciis pri la Internacia Lingvo ricevante flugfoliojn de diversnaciaj.

La Komitato de TEJO pritraktis la nuntempon kaj estontecon de la junulara movado. Kunsidis komisionoj, poste sekvis komunaj diskutoj kaj konkludoj de la Komitato. Precipe temis pri Arbitracia Tribunalo, STELO, NEJO-agado kaj gazeto Kontakto. Dum la lasta kunsido la Komitato elektis jenan estraron: Humphrey Tonkin, D-ro Hans Michael Maitzen, Senad Colic, Hans Bakker, Marian Dobrzynski, Andrzej Grzębowski, Ingrid Carlsson, Ulla Luin, Ulrich Lins kaj Renato Corsetti.

Rapide kuranta semajno estis plena de aranĝoj kaj ofte oni amuziĝis en vere internacia atmosfero ĝis malfrujaj noktaj horoj. Dum la ĝisrevida vespero ni ĉiuj bedaŭris, ke jam estas fino kaj ni devas disiri.

Finante tiun ĉi koncizan raporton, mi ŝatus danki al la Loka Kongresa Komitato, kies membroj preparis kaj organizis ĉion por glata funkciado de la jubilea 25-a IJK.

Ladislav Kaniuga
 eksterlanda fako de JS ĈEA

NOVA VOJO DE JUNULARA ESPERANTO-MOVADO

estis indikita de docento Humphrey Tonkin el Usono, komence de la kongreso ankoraŭ ĝenerala sekretario de TEJO, en lia festparolado:

"Ni estas parolantoj de Esperanto, kaj ni estas ankaŭ gejunuloj. Multaj el ni sentas konligon al la idealoj de nia generacio, kaj dividas simpatian kun la tempesta junularo, kun la

strebado por socia justeco, kaj por agnosko de nia komuna homeco. Tiuj idealoj superas naciajn landlimojn kaj...ili ekzistas en la impulso kiu kunvenigas nin ĉi tie."

"La problemoj de tutmonda paco, de la legitimeco de la milito, de la moraleco de la vastaj elspezoj je defendado kaj armiloj estas demandoj, kiujn ni ne preterpaŝu aŭ evitu pridiskuti. Ni ankaŭ ne evitu esprimi pri ili nian komunan opinion. Nia lingvo servas la homaron en paco, ne la homaron en milito. Sekve ni devas krei kondiĉojn, en kiuj nia lingvo prosperos."

"Ne mankas intereso pri Esperanto inter la junularo, kvankam multaj gejunuloj decidas ne sin ligi al ni. Ĉu eble ili sentas, ke mankas al ni firma konvinko? Ĉu eble ni fariĝis bonaj administrantoj kaj malbonaj pensantoj? Ĉu eble la stranga apatio kiun oni sentas malantaŭ progreso, fontas el manko de celo?"

"Mi prezentu rekte la aferon. Aŭ ni ekmovu nin senŝancele al akcepto de idealoj firme kredataj, aŭ ni mortu je apatio. Ekzistas do elekto de vojoj, sed la elekton oni ne povas eviti. Dum ĉiuflanke la junularo eksklamaciis kontraŭ la nehumaneco de nia epoko, ni ne povas ignori la bezonojn de la propra membraro, kune kun la bezonoj de nia generacio."

DEKLARACIO

akceptita de la partoprenantoj al la 25-a Internacia Junulara Kongreso de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo en Tyresö, Svedio, la 3-an ĝis 10-an de aŭgusto 1969

En pluraj prelegoj kaj diskutgrupoj kun la ĝenerala temo "Junularo kaj Socio" ni pristudis la nuntempan radikalan ŝanĝon de la rolo de la junularo en la socio, kiu montriĝas en intelekta kaj politika mobilizo de la junularo.

La mobilizo okazas ĉefe pro sento, ke la libera evoluo de la individuo estas pli kaj pli endanĝerigata de la establitaj ordosistemoj.

La establitajn ordosistemojn subtenas du tendencoj: unue, malaktualaj kaj tro normigaj konceptoj pri la homo, due, la rapide evoluanta teknologio, kiu emas detrui kaj anonimigi la individuecon, detrui la fizikan ĉirkaŭaĵon de la homo, kaj subfosii la homan psikon.

La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj. Tial ĉiuj ajn aktivecoj pri lingvaj problemoj estas samtempe sociaj aktivecoj.

Se oni konsekvence aplikas la koncepton pri konservo de la integreco de la individuo, oni nepre venas al malaprobo de lingva kaj kultura diskriminacioj en ĉiu formo, al malaprobo de ĉiu tiel nomata solvo de la lingva problemo kiu baziĝas sur diskriminacio, kaj al konstato, ke oni ne sufiĉe atentis la detruadon de la kultura kaj lingva fono de multaj popoloj. Tiu detruado estas nenio alia ol instrumento de lingva imperiismo.

En nia propra laboro ni antaŭvidas esploradon kaj informadon pri la neadekvato de la monda lingva situacio, kaj pri ĝia kunligo kun la detruo de la homa personeco en la nomo de teknologia kaj ekonomia programo.

La mobilizo de la junularo estas subtenenda kaj partoprenenda batalo por la digno de la homo.

La estonta agado de TEJO inkluzivos lanĉon de aktivecoj kiuj celos plivastigi la dimension de la individuo en la socia kaj teknologia evoluo. Tiuj aktivecoj baziĝos sur la specialaj trajtoj de TEJO, kiel organizo laboranta por forigo de ĉia misuzo de lingvoj por ekonomia, kultura aŭ politika subpremo.

Ni alvokas ĉiujn homojn kaj junularajn organizojn al solidariĝo kaj laŭeble kunlaboro en tiu agado de TEJO.

...oooOOOooo...

Skribaĉvando por privataj pensoj

Skribaĉvando estis novaĵo dum la 25-a IJK en Tyresö. Bonvena novaĵo, kiel montris ĝia populareco. Ĝi fakte ne konsistis el vando, sed el papero de la grandeco 1 x 1,5 m, kiun oni ŝanĝis ĉiutage. Ĝi fariĝis la spegulo de la kongresanoj.

Se oni trafolumas la "vandojn" por diversaj tagoj, oni povas rimarki kio estis la intereso de la tago. La unuan vandon dominas biero. "Sveda biero estas tro varma," iu skribis, al kio venis tuj aldono: "La ĉeĥa biero estas multe pli bona" kun rimarko farita per alia skribmaniero "sed...ne havebla." Kompreneble tuj troviĝis malbonulo kiu demandis "Ĉu pli bona ol akvo?"

La sola vegetarano de la kongreso pledis por "plenaj rajtoj al la vegetaranoj dum la TEJO-kongresoj," dum alia konstatis, ke "Kontakto = burĝa gazeto." La nomo de la gazeto de TEJO - Kontakto - ofte revenis sur la vando. "Kontakto kvinpintiĝu" aperis en diversaj formoj, ekzemple kiel "ne kontaktigu Kvinpinton, abonu ĝin" kaj "Gazetoj de la tuta mondo - kvinpintiĝu."

Plej, sube de la lasta skribaĉvando estas trovebla "Fino, dank al...", ŝajne el la koro de iu LKK-ano. Franko Luin

.....
La prikongresaj artikoloj estas represitaj el materialoj senditaj al ni de SEJU. Koran dankon al la sendintoj.

25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO
25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO
25-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO DE TEJO - TYRESÖ, SVEDIO

Slunce neúnavně páliło a my opovštěli autobus s velkými nadějemi a představami, jaké to v Lančově asi bude. Po krátkém pochodu po břehu Vranovské přehrady nás uvítala prostá dřevěná brána s nápisem "Saluton" a několika cizími vlajčkami. Chvíli jsme zůstali stát u brány a dívali se na tábor. V táboře již bylo velmi živo. Uprostřed stál vlajkový stožár, u kterého nás také přijal vedoucí tábora a hned rozdělil do stanů. Bylo to pro nás dost těžké zvyknout si na nepohodlné postele. Kolikrát jen za těch 14 dní nám ty postele spadly! U večere jsme už byli všichni jako jedna velká rodina, a my, co jsme přijeli do Lančova poprvé za poznáním esperanta, jsme s údivem pozorovali naše nové přátele, kteří se pomalu plynule domluvili se zahraničními účastníky SETu.

Na druhý den v půl sedmé byl budíček a rozsvička a v 7.45 po snídani a vztyčení vlajek jsme šli do vyučování. Vyučování probíhalo v přírodě na sluníčku a pro nás začátečníky s velkým zájmem. Esperantu vyučovali dobrovolní učitelé amatéři, ale výborným stylem. Vždy po ukončení vyučování nastala hodina zpěvu, kde jsme se učili zpívat esperantské písně. Odpoledne po obědě bylo samostudium, u některých stanů bylo vidět opravdu poctivé studenty, ale většina stanů zela do 16 hod. prázdnotou. Vždyť to byla ta nejlepší doba na koupání a ježdění na lodičkách.

Po svačině tábor zase trochu ožil. Hrály se míčové hry a hlavně se chystalo dříví na večerní táborák. Společné večery u táboráku patřily k největším a nejkrásnějším zážitkům vůbec. Zvláště naši přátelé z Francie měli vždy moc pěkný program. K jednomu z největších zážitků patří také příprava a průběh karnevalu. Celá Stříbrná zátoka tleskala nápaditým maskám.

Tak plynul den po dni a my si jeden na druhého zvykli. A najednou tu byl den zkoušek. Bylo i trochu zklamání, ale více bylo radosti nad získanými známkami a diplomy. A najednou 14 dnů samého sluníčka, učení, vody a legrace bylo za námi.

Všichni si začali připravovat esperantská slova na rozloučenou. Ještě poslední mohutný táborák, který nám připravili bratři skauti, kteří nám po celou tu dobu přibližovali a vysvětlovali co to vlastně skauting je, ještě jedna společná procházka po Vranovské přehradě a následovalo rozloučení. Naposledy jsme vztyčili vlajku, zazpívali si po esperantsku, a doopravdy se rozloučili.

Jeden z nejčastějších slibů pod vlajkovým stožárem byl "za rok na shledanou." Pak ještě poslední pohled na přehradu, Stříbrnou zátoku a hlavně na tábor, který nám toho tolik sliboval a tolik nádherného dal.

Zdena a Vláša

=====

JUNULARAJ PAĜOJ - oficiala organo de Junulara Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio = redaktas: la Komitato = Adreso: poŝtkesto 168, Praha 1, ĈEHIO, ĈEĤOSLOVAKIO